

# *Obama alvokas entreprenistojn agi kontra? la ekonomia sie?o al Kubo*

---



Dum renkonti?o kun entreprenistoj okazinta en Washington kaj respondante kelkajn demandojn de la a?skultantaro, Barack Obama instigis ilin premi en la Kongreso por haltigi la sie?on altrudatan al Kubo, kaj elstarigis la “signifoplenajn ekonomiajn oportuna?ojn” de la procezo por normaligi la reciprokajn rilatojn.

La prezidento anka? precizigis ke la tuj okazonta vizito de la papo Francisco al Kubo estos “okazo” por ampleksigi la “interesajn dialogojn” jam okazantajn ene de Kubo, la? indikas la informagentejo EFE.

En nova celdeklaro, la prezidento usona opiniis ke Kubo “ne transformi?os de la nokto al mateno” ka?ze de la procezo de rilatnormaligo kun Usono, sed li aldonis ke “neeviteble” kun la tempo tiu proksimi?o “kreos spacon por la persona libereco kaj politika transiro”.

“Estas sence ke ni da?re kateni?u al malnovaj formoj intertrakti” kun Kubo, aldonis Obama rilate al la ekonomia sie?o.

Ekde la anonco farita en decembro pri la procezo por normaligi la rilatojn kun Kubo, Obama montris sin favora al haltigo de la altrudata sieĝo kontraŭ la insulo, kiu daŭras pli ol 50 jaroj, sed tion povas nur la Kongreso forigi.

Pasintsemajne, Obama renovigis unu plian jaron la nomata Leĝo de komerco kun la malamiko, kiu subtenas la ekonomian sieĝon altrudatan al Kubo, tial li povos plu teni aŭtoritatecon ekzekutivan por fleksigi punojn kontraŭ la insulo en la reciproka procezo por normaligi la rilatojn.

La renovigo de tiu leĝo “maksimumigas la flekseblecon de la prezidento por mastrumi la sieĝon al Kubo kaj rajtigi specifajn operaciojn”, precizigis altranga funkciulo usona al la informagentejo EFE.

---

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/69345-obama-advokas-entreprenistojn-agi-kontra-la-ekonomia-siego-al-kubo>



**Radio Habana Cuba**